

NOVEMBRO 2002

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2002:5

Novell om Esperantos
skapares, L.L. Zamenhofs
barndom. Sid. 4-6

**BONVENON AL GÖTEBORG
- GOTENBURGO**

kaj la 88-a Universala Kongreso de
Esperanto 26 julio - 2 aŭgusto 2003

Nästa år: internationell
Esperanto-kongress i
Göteborg. Dags att
anmäla sig

88-a
UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO
Göteborg

Unua Bulteno

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Novembro 2002 • 90-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion:

Leif Nordenstorm

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: nordenstorm@hem.utfors.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi och Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2002: 200 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00

E-post: sef@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2002:

Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*. Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.esperanto.se/eldona

Telefontid: Samma som Esperanto-Centro Stockholm.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Agneta Emanuelsson

Stoppdatum för nästa nummer: 15 november 2002.

Manus till *La Espero*

sänds till Leif Nordenstorm

Järnvägsgård 11

961 76 Boden

tel. 0921-123 54

e-post: nordenstorm@hem.utfors.se

La Espero estas presata  sur recikligita papero.

NI PREZENTAS

Bengt Nordlöf

En Septembro mi havis la ĝojon gastigi Bengt Nordlöf, kiu vizitis mian urban Boden por aĉeti karavanaŭtan aldonajon (*husbilstillsats*).

Mi utiligis la okazon por intervjueto.

Leif: Kiel vi lernis Esperanton?

Bengt: Mi estas denaska esperantisto rilate al la ideo, sed eterna komencanto rilate al la lingvo. En 1994, mi kiel 57-jarulo partoprenis kurson en Karlskoga popola atlernejo. Ĝi estis bonega travivaĵo, i.a. pro la bonaj instruistoj.

Leif: Rakontu iom persone pri vi mem.

Bengt: Mi estas nun pensiulo. Antaŭe mi laboris kiel ĵurnalisto. Mi havas flankokupon kiel abelbredisto. Mi havas du plenkreskintajn gefilojn kaj tri genepojn. Ankoraŭ unu estas survoje. Mi ekzedziĝis, sed nun havas kunulinon. Mi fakte loĝas en du lokoj, Borlänge kaj Farsta.

Leif: Ĉu vi havas iajn taskojn en la Esperanto-movado?

En 1995 mi eniris la estraron de SEF, kaj post 1996 mi dufoje estas prezidanto de Esperanto-gården.

Leif: Kion signifas por vi Esperanto? Esperanto donas al mi grandan ĝojon. Mi estis proksimume 20 fojojn en Hispanio. La unuajn 19 fojojn mi



Bengt Nordlöf laŭ foto sur lia kondukpermeso.


paroletis la anglan. Nur la dudekan fojon mi uzis Esperanton, kaj tiu vojaĝo donis al mi pli da ĝojo ol la unuaj 19.

Nun mi veturis la Boden por aĉeti karavanaŭtan aldonajon, ĉar mi bezonas tian por viziti kongresojn kaj aliajn internaciajn Esperanto-aranĝojn, ĉar mia malnova ruldomo estas eluzita.

Do, por mi Esperanto ne estas hobbio, sed vivstilo.

Intervjuis: Leif Nordenstorm

SKRIBILO • PANA
TANKONATAK
BONA NOKTOMONAT
BONANMATANON.
GOMORO N
LANAON • LAVRA
JES • KARA



SARASESA ESPERANTOSKOLA

Grandeĝa ĝojo por Bengt estas la unua letero en Esperanto, kiun skribis lia nepino, partopreninte kurson en EsperantoGården.

Ĉirkaŭ ulo de Luossa

Ĉirkaŭ ulo de Luossa sidis ja kampara rond",
 ĉe tendara fajro sonis lia kant".
 Kaj pri almuzuloj, kaj vagistoj kaj mirinda mond",
 kaj pri sopiroj liaj estis nokta ĉant'.

-Estas io trans la montoj, trans la floroj kaj la kantoj,
 estas io trajns la steloj, trans la arda kor' de mi,
 Aŭdu! Io iras, flustras, iras logas min kaj petas:
 Ek al ni, ĉar tiu tero, ne la regno ja por vi!

Mi aŭskultis je la kvietaj ondobat' al strand',
 pri ripoz' de la mara muĝo revis mi.
 Kaj en pensoj mi ja kuris al la sen-forma land',
 kie la plej kara pasos for de ni.

Al sovaĝ-etern-sopiro naskis nin patrinoj palaj,
 el naskiĝ-angor' leviĝis la unua plendo-kri'.
 For kun ni sur montojn, kampojn por ruliĝi, ĉarmaj,
 malaj,
 kaj leonon, alkon, dion, almoz-ulon ludis ni.

Sidis mi silenta ĉe la in', ŝi kore amis min,
 ordis ŝi kun molaj manoj en la nest',
 aŭdis mi averton: "Kion vi posedas, lasos vin!"
 Kaj Spirito min forportis al la fest',

Mia amo estas transe, kaj kaŝita el la foro,
 alta, ĝusta kaj mirinda mia ir'.
 Meze en la bruo emis mi ja preĝi al Sinjoro:
 For, la tuta ter'! Pli grandas ol la mondo mond-sopir'.

Sekvu, frato, min trans montoj kun riveroj la kvietaj,
 ja, la maro pace dormas inter montoj kaj kampar'.
 Iuloke trans-ĉiele, mia hejm', patrinoj etaj,
 mez' en or-ŝprucintaj nuboj en mantel' el roza ar'.

Kaj la nigraj, salaj akvoj benu vangojn febro-flamajn,
 ke ni estu mejlojn for del viv' ant' ol matena plen'.
 Ne de tiu mondo, ja, mi kaj suferojn flamo-ardajn
 portis mi pro maltrankvilo, kaj pro amo varma, jen!

Apud konk-ŝutita marbord' staras pord, kaj rozoj pezas,
 kie ŝiprunioj putras, kaj por laca vir' rifuĝ'.
 Ne aŭditaj, altaj kantoj je muzika son' karesas
 sub la volboj, kie por la kar-infanoj estas loĝ'.

Sveda teksto: Dan Andersson (1888-1920)
 Esperantigis: Gustav Stenholm

Idealismo kaj realismo

Ektedas min la nuna skism':
 la tero kontraŭ steloj.
 Idealism' aŭ realism'?
 Fendiĝas cerboĉeloj.

Nur gruzon portretitan vi
 belarto konsideras.
 Sed aerhela nubvizi'
 ĉu ne vizie veras?

Jes, eĉ en pure ora tas'
 la feĉo - feĉo estas,
 sed rozoj en fendita vaz'
 ja ĉiam rozoj restas.

Sveda teksto: Gustaf Fröding
 (1860-1911)

Esperantigis: Magda Carlsson

La mondo

Maron movis uragan'.
 Griza ondaro ruliĝis sen ĉes'.
 "Homon forŝiris la mar", kapitan'.
 "Ĉu jes?"

"Vi povas lin savi ancor', kapitan'!"
 Maron movis uragan'.
 "Ŝnuregon ni ĵetos ancor' kun
 sukces'!"
 "Ĉu jes?"

Griza ondaro ruliĝis sen ĉes'.
 "Li dronas - nun estas li for, kapitan'!"
 "Ĉu jes?"
 Maron movis uragan'.

Sveda teksto: Gustaf Fröding
 (1860-1911)

Esperantigis: Stellan Engholm

Rimarko:

Formoj kiel "ant'" por "antaŭ" kaj
 "ankor'" por "ankoraŭ" ne estas
 korekta Esperanto. En malnova poe-
 zio - ne nur esperanta - tamen estis
 ne malofta okazaĵo ke oni uzis ne-
 korektajn formojn. Tio validas por
 poezio, en kiu la ritmo estas tre grava.

En moderna poezio, kie la ritmo ne
 same gravas tiaj nekorektaj formoj
 preskaŭ tute forestas. En naciaj ling-
 voj oni ofte nomas tiajn formojn per
 la latina esprimo *licentia poetica*. Ebla
 esperanta traduko estas "poezia per-
 meso".

En kantoj poeziaj permesoj estas
 tre oftaj.

Frata donaco

Estas griza oktobra posttagmezo en neriĉa kvartalo. Surstrate homoj rapidas piede, iu knabo lude rulas barelbendon, kaj de flankstrato aŭdiĝas la sono de ŝarĝveturilo trenata de maljuna ĉevalo laca. En la domoj la fenestroj gapas mallume; preskaŭ ĉiuj estas fermitaj kontraŭ la aŭtuna humido kaj malvarmo. Nur iuloke en la dua etaĝo vidiĝas la kapo de juna virino kiu akravoĉe vokas ion suben al knabo surstrate.

Sed ni trairu alian fenestron por veni en salonon etburĝan, kies mebloj ŝajnas simplaj kaj trivitaj, krom kvar seĝoj ĉirkaŭ tablo, kiuj male impresas tute novaj. Kontraŭ la simpleco de la meblaro kontrastas pluraj librobretaroj plenaj de lede binditaj libroj. Detala esplorado malkaŝus librotitolojn ore presitajn per tri malsamaj alfabetoj.

Unuavide nenio en la ĉambro indikas konfesion de la loĝantoj. Neniu krucifikso, neniu naŭva bildo de anĝelo, neniu orumita ikono, neniu sep-braka kandelingo. Se ni trairus la pordon dekstre, kondukantan al eta koridoro kaj kuirejo, ni tamen trovus sur la porda fosto mezuzon, skatoleton kiu enhavas etan pergamenruĵojn kun vortoj el Readmono.

Tamen, ni ne havas okazon pli profundigi en studado de ĉi tiu hejmo, ĉar la salono ne estas senhoma. Paŝas tra ĝi knabino deknunajara en malhele verda robo super kiu ŝi portas brunan trikitan ĵerzon el lano. Ŝi paŝas vigle, senpacience, kaj vokas:

"Lejzer! Lejzer!"

Neniu respondo aŭdiĝas. La knabino post momento ripetas:

"Lejzer! Kie vi estas? Kie vi kaŝis vin?"

Finfine aperas en la pordo de la koridoro knabo dekkvarjara. Li altas decimetron pli ol sia fratino, tamen ne estas tre fortika, kaj li movas sin hezite, kvazaŭ kun embarasiĝo.

"Mi ne kaŝis min!" li diras.

"Ha! Jen vi estas. Lejzer, vi devas iri al Patro! Ne indas kaŝi sin!"

"Mi ne kaŝas min! Kial do mi kaŝiĝu?"

"Vi certe mem scias..."

"Tute ne!"

La knabino nun alprenas tre apartan mienon, samtempe petolan kaj triumfan. Ŝi proklamas:

"Patro aŭdis vin babli kun Feliks!"

"Nu, kaj do?" rebatas la knabo lev-

ante la ŝultrojn.

La knabino tamen gravmiene pluas:

"En la salono!"

"Bone! Ni babilis, certe. Kio do?"

"Vi babilis jide! Endome!"

"Tute ne!"

Tiu respondo aperas tuj, sed sen la konvena mieno kiu fortigus la neon. La knabino male tre serioze riproĉas: "Ne mensogu, Lejzer! Mi aŭdis vin, kaj ankaŭ Aŭgusta."

Ha, jen! Mi devus kompreni, ke la du klaĉulinoj preparis ĉi tion! Sed vi ne diras la veron. Ni tute ne babilis jide. Mi nur citis kelkajn vortojn, kiujn diris la najbaro."

"Nur citis... Tamen estis jidaj vortoj, ĉu ne? Do, vi babilis jide endome." Post tiu konkludo ŝi perdas sian seriozan mienon kaj ekkantas, laŭ melodio monotone moka: "Ha ha, Lejzer babilis jide endome, Lejzer babilis jide endome..."

"Ĉesu do, stulta Fanja! Se la najbaro parolis jide, do kion fari? Ĉu mi estas interpretisto?"

"Do, kion diris tiu najbaro? Diru ankaŭ al mi!"

"Ĉesu do!"

"Ne! Kion li diris?" La voĉo de la knabino esprimas spiton kaj scivolon. La knabo refoje levas la ŝultrojn, pensas dum momento kaj poste diras kvazaŭ defie:

"Ke knabinetoj zorgu pri si mem kaj ne ŝovu la nazon en fremdan vazon!"

"Ha, vi mensogas denove! Ne tion vi diris al Feliks. Sed nun iru al Patro! Rapidu, do! Mi esperas, ke li severe riproĉos vin. Eble li batos vin..."

"Stulta knabineto! Kial li batu? Li ne batas... Sed vi mem bezonus aplaŭdon sur la vango, klaĉulino..."

La knabino ĉesas incitadi sian fraton, kaj li nerapide ekiras al la fermita pordo de laborĉambro. Li haltas antaŭ la pordo kvazaŭ por mense prepariĝi, poste frapetas al la pordo, atendas nelaŭtan respondon de transe, malfermas la pordon kaj eniras.

Ĉe skribtablo sidas lia patro kun plumo enmane. Li estas duonkalva, nealta kvardekjarulo kun okulvitroj. Li portas kompleton ne tute laŭmodan, kun kubutumoj brilantaj pro longa frotado. Kiam la knabo senvorte alvenas kaj haltas apud la skribtablo, la patro demetas la plumon kaj

aĝustigas la okulvitrojn.

"Venu ĉi tien, Lazaro", diras la patro, kvazaŭ preparinte eraran prelegon, ĉar la knabo jam staras je unu paŝo de li. Li tamen ne montras malobeemon, sed faras ankoraŭ paŝeton antaŭen, kaj lia patro pluas, viŝante kaj remetante la okulvitrojn:

"Nun ni jam vivas en Varsovio kaj devas adaptiĝi al kondiĉoj en urbeĝo. Tio donos al ni novajn oportunojn, certe. Vi baldaŭ komencos frekventi gimnazion, ĉu ne. Kaj por mi troviĝas ĉi tie pli bonaj laborkondiĉoj. Sed la urbeĝo havas ankaŭ siajn riskojn kaj tentojn. Ĉu vi komprenas?"

"Jes, Patro... proksimume..."

"Proksimume? Ĉu proksimume? Kion do vi komprenas?"

"Nu... ĉi tie troviĝas... ekzemple ŝtelistoj kaj malmoralaj personoj..."

"Certe, certe. Friponoj grandaj kaj malgrandaj. Bubaĉoj. Ankaŭ en nia strato, Nowolipie."

La knabo rigardas sian patron senvorte, kvazaŭ por esplori, kion li celas.

"Aŭskultu, Lazaro! Ni nun vivas en la plej grava urbo de la poloj. Vi enskribiĝos, mi esperas, en filologia gimnazio. Vi devos nun multe plibonigi vian polan lingvon. Kaj vi ekstudos novajn lingvojn. Latinon, kiu estas grava lingvo por la poloj. Grava, sed malfacila..."

"Jes, Patro. Sed... ĉi tie en la strato Nowolipie kaj eĉ en la tuta kvartalo neniu parolas pole..."

"Mi scias. Domaĝe, ke ni devis ekloĝi ĉi tie, en la hebrea kvartalo. Jen la granda tragedio de la hebreaĵoj, Lazaro, ke oni ekskludas sin, fikstenas siajn apartaĵojn. Cetere, ne forgesu, ke ni estas ruslandanoj! Ne forgesu nian belan, riĉan rusan lingvon!"

"Ne, certe mi ĝin ne forgesos... Mi amas nian lingvon, la rusan..." La nelaŭta voĉo de la knabo ekhavas brilan sonoron, kiam li eldiras ĉi tion. Ni imagas, ke jen io grava kunligas la knabon kun lia patro.

Post momenta silento la patro daŭrigas:

"Krome, se vi volas paroli germane, parolu la veran germanan! La lingvon de Heine! Lazaro, montru, ke vi estas edukita knabo. Ne enlasu en nian hejmon ian stratbuban fuŝan jargonon, tiun judgermanan degeneraĵon!"

La knabo nun kuntiras la brovojn sed ne aŭdiĝas komenton.

"Vi nenion respondas?"

"Nu, Patro... hejme mi ja parolas ruse... sed ĉi-strate ĉiuj homoj parolas jide, ne ruse, nek pole. Kaj se mi surstrate parolus germane... do la germanan el libroj, se tiel diri, oni verŝajne... oni pensus..."

"Kion?"

"Nu... oni pensus, ke mi estas tro fieriĉa." La rigardo de la knabo vagas ĉirkaŭ la ĉambro sed evitas la okulojn de la patro, kiuj aperas malgrandaj tra la okulvitroj.

La patro faras geston kvazaŭ por refoje viŝi tiujn okulvitrojn, sed ek-konsciante ke ili jam perfekte klaras, li lasas ilin surnaze.

"Lazaro, ne okupiĝu tiel multe pri tio, kion pensas ĉifonaĵ stratbuboj aŭ stultaj servistinoj aŭ vantaj komizoj aŭ senedukaj nenifaruloj. Imagu, Lazaro, la germana lingvo de Heine estas mirinda, bela, riĉa, potenca lingvo! Se vi lernos regi ĝin, vi rajtos esti fiera! Eble kiel plenkreskulo vi jam povos vojaĝi en Breslaŭon, en Dancigon, en Berlinon, kaj tie vi ne parolu ian judgermanan kriplajon. Imagu, ke en la Germanaj landoj la hebreoj parolas la veran germanan lingvon – ja vi scias, ĉu ne, ke Heine naskiĝis hebreo! Inter la germanoj eĉ la vorto "judo" ne estas moka aŭ malestima. La germanoj estas kulturita popolo, kiu respektas ĉiujn homojn. Inter ili neniam okazos tiaj pogromoj kontraŭ hebreoj, kiel tragike okazas inter la senkulturitaj rusaj vilaĝanoj... En nia Ruslando nur la gvidantoj estas kulturitaj, dum inter germanoj la tuta popolo... Eble ankaŭ ĉar la germanaj hebreoj ne strebas distingi sin per aparta vesto, aparta lingvaĵo kaj tiel plu. Ili estas tute normalaj civitanoj, komprenu! Eble, kiam vi estos plenkreska, vi spertos tion ankaŭ ĉe ni en Ruslando."

"Tamen, ja kelkaj opinias, ke ĉar ni estas aparta popolo, do..."

"Aparta popolo, ĉu? Fu! Ĝuste tio estas nia tragedio, ke ni apartiĝas! Ja mi jam diris tion. Ni estu ruslandanoj! Se ni volas respekton de rusoj, ni parolu ruse, la lingvon de la tuta imperio!"

"Tamen oni jam verkas librojn en la jida... Kaj eldonas gazetojn..."

"Sed kiajn? Klaĉaĵojn por stultaj fraŭlinoj sen eduko! Stultajn rakontojn por la vilaĝanoj de Galicio..."

"Kaj eĉ en la hebrea iuj provas verki..."

Nun la patro ŝovas sian seĝon malantaŭen, klinas sin dorsen, etendas antaŭ si la kruojn kaj finfine demetas la ĝenajn okulvitrojn, kiujn li komencas faldi-malfaldi dum li pen-seme parolas.

"Nu, tio estas vera strangajo... Kiel revivigi la lingvon de niaj prapatroj, kiu estas morta jam de la Babilona mallibereco? Lingvo jam mortinta neniam reviviĝos, jen certaĵo kaj leĝo

kiel amen post preĝo. Ne turmentu vian kapon pri tiaj vantaĵoj, Lazaro! Lasu la hebrean al la religiaj libroj, al la rabeno, al la sabata recitado. Ja mi jam diris, ĉu ne, ke la poloj havas sian latinon. Sed ĉu ili verkas librojn en ĝi? Neniam mi aŭdis tian frenezajon..."

La knabo, ĝis nun necerta kaj ema konsenti nun sia patro, nun ekhavas preskaŭ spitan mienon dirante:

"Tamen ili havas sian propran lingvon, la polan. Ili ne parolas ruse. Do, kial ni ne..."

La patro paŭzas kaj lasas siajn okulvitrojn fali sur la skribtablon.

"Ne komencu disputi, Lazaro! Vidu, ĉiu lingvo havas sian lokon, sian taskon, sian povon. La hebrea kaj la latina estas lingvoj de la religio kaj de la prapatroj. Ni respektu ilin, ni studu ilin, ĉar ili malfermas al ni mirindajn mondojn el la pasinteco. La judgermana estas jargono de la strato, de la gastejoj, de la pulbazaroj! Ni ne intermiksi tiujn rolojn. Ja neniuj tajloroj provas kudri per martelo, kaj neniuj forĝistoj atakas la ardan feron per kudrilo! Neniuj provas lavi tolojn en fojnejo aŭ legi librojn en stalo!"

"Komprenoble ne..."

"Imagu, se Heinrich Heine verkas en juda dialekto! Aŭ Puŝkin kaj Lermontov en belorusa kamparana idiom? Same oni ne eldonas skandalgazetojn latine, nek amromanojn en la lingvo hebrea. Ni esperu, ke neniam aperos tia abomenaĵo!"

"Ĉu vere ĉiu lingvo havas apartan trajton?"

"Pli-malpli, ŝajnas, pli-malpli." La patro profundiĝas en cerbumojn. "Ekzemple la pola ja estas bela kaj nobla lingvo, tamen kiel kultura lingvo... nu, eble post jarcento... Ĝis nun, ŝajnas al mi, ĝi estis plejparte lingvo de sensciaj kamparanoj kaj fieraj nobeloj. Jes ja, eleganta kaj fieraj lingvoj ĝi estas... La franca... nu, kion diri? Ĝi estas preskaŭ egala al la germana aŭ rusa, tamen kun granda malpezeco... Iomete frivola lingvo estas la franca. Kaj la itala ja estas la lingvo de muziko, jen ĉio! Ĉu imagi sciencan en la itala? Tio ŝajnas tro malserioza penso. La greka, la helena, male estas lingvo de antikva scienco kaj kulturo. Ankaŭ la latina, kaj krome ja kulta lingvo de la katolikoj. Nia hebrea – nu, jam dirite, la lingvo de Abrahamo, kaj la aramea – lingvo de multaj saĝaj hebreoj en pli malfrua tempo. Kiuj ankoraŭ? Jes ja, la angla de maristoj, la nederlanda de komercistoj. Kaj la araba, la turka, la ĉina... nu, jam sufiĉas! Ĉiuj malsamaj, sendube."

Estiĝas eta paŭzo, ĝis la knabo revekiĝas post ioma tediĝo kaj demandas:

"Ĉu do neniuj lingvoj taŭgas por ĉio?"

"Eble ne por ĉio. Tamen la grandaj, la gravaj kulturlingvoj, kiel nia rusa lingvo, aŭ kiel la germana, ja estas

uzata por preskaŭ ĉio. Ĉiutage, por studoj, en scienco, en literaturo, eĉ por religio, sed tio dependas de la kredo. Ja hebreoj kaj katolikoj uzas apartajn lingvojn por la religio, sed aliaj ŝajne ne bezonas tion. Tamen mi pensas, ke ĉiu lingvo havas sian centron, sian pezopunkton... La germana estas antaŭ ĉio lingvo de scienco kaj filozofio. Nia rusa estas lingvo de kulturo. Tamen, kompreneble ankaŭ Ruslando havas grandajn sciencistojn..."

"Sed la poloj opinias, ke ankaŭ ilia lingvo taŭgas por ĉio..."

Refoje la voĉo de la knabo sonas pli vigla, spita, sed lia defiera rigardo renkontas tiun de la patro, kiu ŝajnas zorgema, eĉ tima.

"Atentu, Lazaro! Se vi aŭdos tiajn dirojn, zorgu ne enmiksiĝi en iujn konversaciojn. Tio estas riskoplena kampo! Vere, inter la poloj troviĝas kelkaj tre danĝeraj ideoj, kiujn la caro jam severe punis. Restu for de tiaj diskutoj! Kiel hebreo vi finfine trovos vin ĉies propeka kapro..."

"Kaj mi aŭdis, ke iuj hebreoj volas migri en Amerikon por fondi apartan hebrean nacion. Eble tie la jida lingvo tamen estos plenrajta..."

Denove la patro paŭzas malestime: "Silentu do! Malsaĝaj revoj! Kaj danĝeraj! Mi malpermesas al vi aŭskulti tiajn vantajn ideojn! Imagu! Hebrea nacio inter sovaĝaj indianoj kaj ĉiaspecaj frenezuloj, kiuj forkuris de ordo kaj civilizo! Terura ideo! Kaj mi volas ne plu aŭdi stultajn pri "la jida lingvo". Tio ne estas vera lingvo, sed kripla dialekto, miksaĵo, balbutaĵo de needukitaj superstiĉaj homoj el la urbetoj. Tiel facile oni ne kreas veran lingvon!"

Kiam la knabo revenas en la salonon, tiu estas senhoma. Li iras ĝis librobreto, post momento elektas libron kaj sidiĝas sur la sofon. Tie li restas sidanta, enpense, sen malfermi la prenitajn libron, ĝis lia fratino revenas per viglaj paŝoj. Ankaŭ ŝi sidiĝas sur la sofon rigardante sian fraton. Post momento ŝi kvazaŭ vestas sin per la mokema rideto, kiun ni jam rekonas, kaj diras:

"Nu, ĉu vi ricevis vergadon?"

"Stulta Fanja, vi mem bezonus tian!"

"Tamen li tre riproĉis vin, ĉu ne? Mi aŭdis lian voĉon."

"Tute ne. Ni nur... iom diskutis."

La knabo ŝajne emas eviti la temon, sed lia fratino nur gaje rikanas: "Vi diskutis? Kun Patro? Kia fabelo!"

"Kial do? Mi ne estas tia stulta infaneto kiel vi kaj Aŭgusta."

"Ha! Mi diros al Panjo, ke vi insultas!"

"Bone do. Kuru klaĉi al Patrino. Kuru klaĉi, kiel kutime."

Estiĝas paŭzo. Tamen, se la knabo kredis, ke li forregalos la fratineton



L.L. Zamenhof
16-jara.

per tia akuzo, li miskalkulis. Ŝi baldaŭ remastras sin, kaj nun ŝajne la scivolo superas ŝian mokemon:

"Nu, se vi diskutis, pri kio do vi diskutis? Ĉu eble pri tio, ke vi babilis jide endome...?"

Nun la knabo evidente decidis alpreni tre plenkreskulan pozon, kaj li ekprelegas al la fratino:

"Ni interparolis pri diversaj lingvoj, ankaŭ pri la jida. Patro kaj mi ne havas tute saman vidpunkton pri tiu afero. Sed ankaŭ pri aliaj lingvoj."

"Do, kion diris Patro pri la jida?"

"Nu... ŝajne li opinias, ke ĝi ne estas vera lingvo, kiel la rusa."

"Kial ne?"

"Nu... eble ĉar... oni ne instruas ĝin en lernejoj... kaj ne troviĝas tre multe da libroj en la jida..."

Jen la knabino saltetas pro malkonsento:

"Ĉu ne? Mi vidis amason! Ĉe sinjorino Goldberg en la kvara etaĝo estas multaj... eĉ la tuta Torao en la jida! En libro, ne rulaĵo. Tio estas por ke ankaŭ virinoj povu legi ĝin. Ĉar ni ne rajtas lerni la hebrean... Tio estas maljusta!"

"Jes, tamen..."

"Kiam mi estos pliaĝa, mi volas lerni la hebrean! ... Aŭ eble ne, ĉar ĝi certe estas tre malfacila. Lejzer, ĉu vi pensas ke mi povus lerni la hebrean?"

"Ĉu vi? Stultulino..."

"Ne, nun diru serioze, sincere!"

"Bone, ja ĝi estas malfacila... La plej multaj vortoj estas aliaj... tamen kelkaj similas la jidan, ĉar la jida ĉerpis vortojn el la hebrea. Sed plej mal-

facile estas diveni la vortojn, ĉar oni ne skribas la vokalojn... krom kelkfoje per iaj helpaj punktetoj..." Unuafoje li malfermas la libron kiun li tenas enmane kaj montras al la knabino ion en paĝo ŝajne hazarde elektita.

"Jen vidu!"

La fratino ne impresiĝas.

"Tio estas stulta! Kial ne skribi la vokalojn? Tion oni ja faras jide!"

"Nu, mi ne scias kial..."

"Kaj ruse!"

"Prave, sed eble antikvatempe oni trovis tion nenecesa... Pripensu ke ĝi aĝas jam jarmilojn!"

"Estas stultege! Imagu, se mi p'r'l's s'n v'k'l'j. Ĉ' v' k'mpr'n's k'n m' d'r's?"

"Ĉesigu viajn stultaĵojn, anserino! Oni ja ne parolas senvokale, nur skribas!" Li frapfermas la libron, kaj nubeto el polvo ekŝvebas super la gefratoj.

La knabino reveme plubabilas:

"Mi ŝatus lerni pliajn lingvojn, sed prefere facilajn. Kiu estas la plej facila lingvo?"

"La plej facila? Hmmm. Mi ne scias... Dependas, kiujn oni jam scias... Kaj ŝajnas al mi, ke ĉiu lingvo havas siajn tuberojn... Plej facilas tiuj, kiujn oni parolas denaske, ĉu ne?"

"Do la rusa kaj la jida?"

"Por ni jes. Sed por poloj plej facilas la pola."

"Ankaŭ por mi ĝi estas sufiĉe facila! Mi preskaŭ flue parolas ĝin!"

"Sed mi pensas, ke por... ekzemple germano aŭ franco, la rusa kaj pola ne estas facilaj."

"Kial do?"

"Nu... ekzemple pro tio ke la vortoj multe ŝanĝiĝas... depende de kazoj."

La knabino ekpensas dum momento kaj poste diras kun miksaĵo el naivo kaj seriozo:

"Mi ŝatus lerni la plej facilan lingvon de la mondo!"

La knabo ridetas, kaj lia serioza mieno moliĝas. Preskaŭ reveme li diras:

"Kaj mi preferus lingvon, kiu taŭgas por ĉio, en ĉiuj situacioj... Mi ne ŝatas tiun ideon, ke oni bezonas diversajn lingvojn por malsamaj aferoj. Kial estu tiel? Tio ŝajnas senseca! Ĉiuj homoj ja devas interparoli pri la samaj aferoj, pli-malpli... rusoj, poloj, germanoj, hebreoj... ili ne povas havi tiel malsamajn bezonojn..."

"Ha! Ĉu vi pensas, ke vi estas pli saĝa ol Patro?"

"Tute ne! Ne temas pri tio..."

"Do pri kio?"

"Nu... ŝajnas al mi, ke Patro ĉefe parolis pri kiel *estas*. Sed mi cerbumas pri kiel *devus esti*... Se nur la homoj agus prudente..."

"Se ne estus se kaj tamen, mi al ĉio dirus amen. Do vi deziras lingvon por ĉiuj okazoj, kaj mi la plej facilan lingvon el ĉiuj. Ni devus iri al iu inventisto, por ke li elpensu tian lingvon!"

Denove la knabo ridetas, kaj ni nun vidas, ke li efektive amas sian fra-

tionon, eĉ se ŝi fojfoje incitas lin.

"Stultulino... Tiel facile oni ne inventas lingvon..."

"Kial ne? Kiam Patro kaj Patrino estis infanoj, ne estis lokomotivoj. Poste oni eltrovis ilin."

"Sed lingvo ne estas maŝino! Ne estu tiel naiva, Fanja!"

"Tamen, ankaŭ alion oni eltrovis! La vakcinon, ekzemple. Tio ne estas maŝino!"

"La vakcinon?! Fanja, vi estas amuza, sed kiel tio rilatas al lingvoj?"

"Neni! Mi volas diri nur, ke oni povas eltrovi diversspecajn aferojn. Ankaŭ Amerikon oni eltrovis!"

Unuafoje nun la knabo ridas, aldonante:

"Sed oni ne inventis ĝin, stultulino! Ĝi kuŝis tie en la maro jam antaŭe!"

"Tamen, vi komencos la gimnazion kaj studos pliajn lingvojn, eĉ latinon, ĉu ne? Ĉu vi ne povus inventi al mi etan lingvon? Kiel donacon?"

"Fanja, Fanja... ĉu oni nun jam donacas lingvojn?"

"Al mi jes!" Ĝi alprenas mienon afekte petolan, preskaŭ koketan. "Unu facilan lingveton, mi petas! Je mia naskiĝtago... Alie, se vi ne faros tion, mi eklernos la hebrean... kaŝe... kvankam mi estas knabino!"

Bonhumore la frato reciprokas ŝian ŝercon:

"Bone do... por komplezi al la fratineton... mi inventos lingvon... taŭgan por ĉio kaj krome facilegan..."

Jen la knabino eĉ aplaŭdas pro konsento. Finfine la frato evidente decidis konludi en ŝia eta komedio, ŝi ŝajnas pensi.

"Ĉu vi promesas? Vere?"

"Mi promesas. Almenaŭ – mi provos."

La du infanoj dum kelka tempo silentas pensante, la knabo kun profunde cerbuma mieno, kvazaŭ nenion rimarkante ĉirkaŭ si, sed la knabino pli petole, senpacience. Ĝuste kiam ĝi stariĝas, ŝajne laca de tiom da silentado, aŭdiĝas paŝoj en la koridoro kaj en la pordo aperas virino, la patrino de la gefratoj. Ŝi vokas:

Fanja kaj Lejzer, vespermanĝo preta! Fanja, iru averti vian patron!" Kaj ŝi reiras foren tra la koridoro.

La knabo levas la kapon kvazaŭ ĵusvekte. "Ĉu vespermanĝo?" li murmuris. "Kion ni ricevos?"

La knabino retrovas sian viglon, ekstaras ridetante al li:

"Ĉu vi ne flaras la odoron? Farĉita fiŝo, evidente! Via preferaĵo, ĉu ne?" Kaj ŝi dancete ekiras kontraŭ la laborĉambregon por anonci la vespermanĝon al sia patro.

La knabo nerapide iras koridoren, daŭre profunde en pensoj.

Sten Johansson

Etaĝoj, ordonoj kaj mondoj: Esperanto ne solvas ĉiujn lingvajn problemojn

Kiu etaĝo estas la "unua etaĝo" de la domo? En kelkaj landoj oni diras ke la teretaĝo estas la "unua etaĝo". En aliaj landoj oni nomas nur la unuan etaĝon super la teretaĝo "unua etaĝo". En Svedio oni ordinare uzas la unue menciitan sistemon.

En Esperanto oni heredis la ne-unuanimecon pri etaĝoj. Tamen oni ordinare uzas la nesvedan sistemon kaj diras ke sur la tero staras la teretaĝo kaj super ĝi (*en trappa upp*) estas la unua etaĝo.


Nesveda
(i.a. germana)
sistemo

Unua etaĝo

Teretaĝo

Tiu ĉi sistemo estas la plej ofte uzata en Esperanto.

Desegnis:
Matilda
Nordenstorm



Sveda
sistemo

Dua
etaĝo

Teretaĝo
(Unua
etaĝo)

Dek ordonoj

Eĉ pli ĥaosa estas la situacio pri la dek diaj ordonoj. Pri ili ekzistas eĉ tri malsamaj sistemoj pri la numerado. La kialo de tio ne estas lingva diverseco sed religia diverseco.

Se oni atente legas la tekston en la dudeka ĉapitro de Eliro (*Andra Mosebok*) pri la ricevo de la ordonoj oni rimarkas ke fakte ne estas tute klare ke temas pri dek ordonoj. Estas dekkelk (*ett tiotal*) ordonoj, sed multaj el ili estas tiel similaj ke oni prefere kalkulu ilin kiel partojn de la sama ordono.

Judoj kaj ortodoksaj kristanoj opinias ke la unua ordono estas tiu, kiun obeis Dio: elkondi la hebrean popolon el Egiptio. Nek katolikoj, nek luteranoj, nek reformitoj opinias ke tio estas ordono; laŭ ili ordonoj estas nur tiuj, kiujn devas obei homoj. Reformitoj tamen ne kalkulas same kiel katolikoj kaj luteranoj. Laŭ reformitoj la ordono "ne faru al vi idolon" estas memstara, ĉar la reformita eklezio evitas bildojn en preĝejoj. Se vi iam vizitas la centran oficejon de UEA en Roterdamo vi povas viziti la urban katedralon kaj konstati ke preskaŭ tute mankas bildoj! La reformitoj pro tio devis kunigi la du lastajn ordonojn (laŭ katolikoj kaj luteranoj) en unu.

Dek ordonoj laŭ tri diversaj numeradoj

JO KLR JO: juda/ortodoksa numerado; KL: katolika/luterana numerado; R: reformita numerado

- | | | | |
|----|----|----|---|
| 1 | - | - | Mi estas la Eternulo, via dio, kiu elkondukis vin el la lando Egipta, el la domo de sklave CO. |
| 2 | 1 | 1 | Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ mi. |
| - | - | 2 | Ne faru al vi idolon, nek bildon; ne kliniĝu antaŭ ili. |
| 3 | 2 | 3 | Ne malbonuzu la nomon de la Eternulo. |
| 4 | 3 | 4 | Memoru pri la tago sabata, ke vi tenu ĝin sankta. (Dum ses tagoj laboru kaj faru ĉiujn viajn aferojn; sed la sepa tago estas sabato de la Eternulo, via Dio.) |
| 5 | 4 | 5 | Respektu vian patron kaj vian patrinojn, por ke longe daŭru via vivo sur la tero, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi. |
| 6 | 5 | 6 | Ne mortigu. |
| 7 | 6 | 7 | Ne adultu. |
| 8 | 7 | 8 | Ne ŝtelu. |
| 9 | 8 | 9 | Ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston. |
| 10 | 9 | 10 | Ne deziru la domon de via proksimulo; |
| | 10 | | ne deziru la edzinon de via proksimulo, nek lian sklavon, nek lian sklavinon, nek lian bovon, nek lian azenon, nek ion, kio apartenas al via proksimulo. |

Inter luteranoj ofte uzata kunigo de n-roj 9 kaj 10:

(Ne deziru ion, kio apartenas al via proksimulo.)

Ĉu tio ĉi gravas nur por religiuloj? Ne! Se oni legas romanon, kaj estas skribite ke iu pekis kontraŭ la sesa ordono, la legantoj interpretas tion malsame, depende de en kiu kulturo oni loĝas. Por kelkaj li estas murdisto, por aliaj adultulo.

Se oni tradukas libron el nacia lingvo en Esperanton, oni povas eviti la problemon, ekzemple aldonante piednoton kun la ordono.

Kvar mondoj

Dum la malvarma milito oni iam parolis pri "la tria mondo". Oni supozis

ke la okcidentaj landoj estis la "unua mondo"; la komunismaj estis la "dua", kaj la landoj en Latinameriko, Afriko kaj Azio la "tria".

Kelkaj homoj komencis paroli eĉ pri la "kvara mondo". Tiu esprimo tamen ne estis same disvastigita kaj ĝi eĉ ne havis la saman signifon en diversaj lokoj. Indiĝenaj popoloj en diversaj landoj nomis sin la "kvara mondo"; samtempe francaj socialistoj nomis malriĉajn homojn en riĉaj landoj la "kvara mondo".

Mi tamen ne estas certa ĉu oni ankoraŭ uzas tiujn ĉi esprimojn.

Leif Nordenstorm

Sölvesborg kunlaboras kun Esperanto-klubo

En La Espero 2002-2 ni menciis ke la komunumo Sölvesborg, kun helpo de la Esperanto-klubo de Västerås havas kontakton kun sia ĝemela urbo Malbork en Pollando.

La 21-an de septembro estis tempo inaŭguri memorŝtonon en parko en Malbork. La reprezentantoj de la klubo en Västerås estis Gudrun Nerpin, Helena Kotilainen, Bengt Nordlöf, Kaj Stridell kaj mi.

Okazis la inaŭguroj de naŭ novaj memorŝtonoj kun la apartenantaj arboj, kiuj reprezentas Brazilon, Ĉeĥion, Hungarion, Irlandon, Latvion, Litovion, Pollandon kaj Svedion (2 ŝtonoj). La programo estis tre aloga kaj varia. Infanoj kun fungo-ĉapeloj interrompis la naŭ inaŭgurojn per dancetoj kaj kantado en tre klara Esperanto.

Kiam mi rondiris kaj filmis proksime de du knabinoj, unu de ili diris, dum mi preskaŭ ne rimarkis tion, "Mi estas Agata". Tiam mi demandis la amikino pri ŝia nomo. Ŝi respondis tuj "Mia nomo estas Julia." Eble estis la unua fojo, ke ili kuraĝis paroli kun eksterlandano en Esperanto.

Ĉeestis la inaŭguron ankaŭ multaj oficialaj reprezentantoj.

Estas nun entute 18 memorŝtonoj en Parko de la mondo, kiu situas apud Placo Zamenhofska.

Wim Posthuma

Unua kongreso en Mongolio

Okazis la unua Mongola Esperanto-Kongreso en julio periferie de la ĉefurbo Ulanbatoro. Partoprenis kvardeko da esperantistoj kun la prezidanto de UEA, Lee Chong-yeong.

La redaktoro de La Espero proponas ke ni svedoj sendu gratulajn poŝtkartojn al: Mongola Esperanto-Centro, p/a D. Ganbaatar, PO Box 91, Ulanbaatar - 28, Mongolio.

Japanio renovigis

Japana Esperanto-Instituto renovigis sian Esperanto-domon en Tokio. Ĝi nun enhavas klasĉambron, librovendejon, kunsidejon, bibliotekon ktp. Baldaŭ estos instalita ankaŭ brajla presilo. La renovigo estis ebla dank' al granda donaco de mecenato.

La instituto posedas ankaŭ feridomon en la kamparo. En 2007 la UK cetere okazos en Japanio.

Informado en Sud-Afriko

Okaze de Monda konferenco pri daŭrigebla disvolvigo en Johanesburgo 19 aŭgusto - 4 septembro 2002, esperantistoj disdonis milojn da dosieroj pri Esperanto al la delegitoj. Multaj homoj interesiĝis kaj petis pli da informoj. Okazis ankaŭ intervjuo en radio.

Ruth Gullberg

Fidela SEF- kaj KELI-membrino forlasis nin la 14-an de aprilo. Ruth ofte partoprenis niajn enlandajn kaj eksterlandajn kongresojn. Certe multaj geamikoj memoras ŝian afablan, modestan personecon.

Jam en 1934 Ruth Gullberg (1910-2002) partoprenis Universalan kongreson en Stokholmo. Estis granda sensacio en la malgranda loko Grycksbo kiam ŝi kaj ŝiaj tri fratinoj partoprenis la UK-n en Varsovio en 1937! Inter 1973 kaj 1976 ŝi estis sveda KELI-kasisto kaj sekve ŝi ankaŭ fariĝis kasisto por la KELI-kongreso en Jönköping en 1975.

Cetere ŝi dediĉis sian liberan tempon al la Misifederacia komunumo, dum multaj jaroj kiel organisto, kasisto, gvidantino por gejunuloj kaj poste por la kudra rondo.

Britta Rehm

Harry Persson

Nia Esperanto-societo en Gotenburgo la 26-an de aprilo perdis fidelan membron.

Harry Persson (1918-2002) esperantistiĝis almenaŭ antaŭ 50 jaroj. Persone mi ekkonis Harry-n meze de la 60-aj jaroj kiam mi mem aperis inter la esperantistoj en Gotenburgo. Ni laboris kune en la loka KELI-klubo.

En la KELI-kongreso en Jönköping en 1975 li i.a. amuziĝis nin per sia muziko de buŝharmoniko.

Harry mankas al ni kaj ni estas dankemaj ke ni tiel longe havis lin inter ni.

Britta Rehm

Isidor Lundmark

En junio ĉi-jare forpasis lia Isse. Isidor Lundmark (1910-2002) naskiĝis en norda Svedio kaj kiel 17-jarulo komencis lerni esperanton. Lia senlima intereso pri homoj kaj popoloj igis lin traveturi la tutan Eŭropon per aŭto - eĉ kelkfoje - kaj ĉiam en ligo kun iu esperanta aranĝo; kursoj, kongresoj aŭ vizitoj ĉe iu el siaj multnombraj amikoj. Li ankaŭ ĉeestis esperantajn kongresojn en Sudameriko, Koreio, Japanio kaj Ĉinio.

Hejme li aktivis en la loka klubo en Örebro, kie li vivis kun la familio. Lia hemo estis ĉiam malfermita por esperantistoj el diversaj partoj de la mondo, sed ankaŭ sennombraj estis kunvenoj de esperantistoj en lia dometo, kie povis kolektiĝi deko da personoj.

Melitta Dörr



La memorŝtono de Västerås kaj Sölvesborg en Parko de la mondo en la pola urbo Malbork. Fotis: Wim Posthuma.

DONACOJ

ROLDO LANGLET
Ĉiumonataj donacoj: Ingrid Göransson, Kalmar 200 kr; Leif Nordenstorm, Boden, 150 kr; Lenart Sundman, Västerås, 100 kr; Göran Lundgren, Stockholm, 100 kr; Tore Johansson, Kalmar, 100 kr; Signhild Johansson, Kalmar, 100 kr; Börje Andersson, Skövde, 100 kr; Bengt Nordlöf, Stockholm, 84 kr; Sten Anders Hanerz, Skotgås, 84 kr; Wim Posthuma, Västerås, 50 kr.

Se vi volas aliĝi al Rondo Langlet, kontaktu al SEF-kasiston Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-412205, e-poŝto: freds@artech.se

KONTRIBUO AL SEF-PARTOPRENO EN LERNEJA FORUMO
Brita Rehm, Göteborg, 3000 kr.

FONDUSO 70+
Inger Arwedson, Huskvarna, 100 kr.

MEMORE AL ANNA-GRETA PAHNKE
Sundsvalls Esperantoförening, 100 kr.

MEMORE AL CARL H NÄSLUND
Sundsvalls Esperantoförening, 150 kr.

SEF kore dankas por la donacoj. Novaj estas bonvenaj al pĝ. 2012-3.

Trofeo Fyne al SEJU

En la universala kongreso en Zagreb en 2001 Sveda Esperanto-Federacio ricevis la trofeon Fyne, kiun UEA donas al landa asocio, kiu estis aparte aktiva. Laŭ la reguloj la landa asocio devas pludoni la trofeon al loka organizaĵo. La estraro de SEF decidis doni la trofeon al Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo (SEJU), pro ilia bona kunlaboro kun TEJO pri diversaj seminarioj, precipe seminario pri Esperanto en interreto. SEJU aktive laboris por ricevi financajn subtenojn kaj vere sukcesis en tio.

Vizito de japanaj blinduloj

En Gotenburgo okazis la 7:a internacia kongreso "Low Vision 2002", 21 - 25 julio. Prelegis esploristoj kaj pedagogoj en la kampo de vido au malvido. Inter la partoprenantoj estis grupo el Japanio, pri kiu Krizantemo, japana esperantistino, sendis mesaĝon al la E-klubo antaŭ la kongreso. Ŝi volis, ke ni montru, ke per Esperanto oni facile havas kontaktojn en la tuta mondo.

Mi skribis al Toshiaki Aomatsu kaj li respondis ke la teamo volonte renkontus nin. Ni decidis rekontiĝi la 23:an de julio kaj de kie veturigi ilin. Tri blindaj kaj tri vidantaj personoj estis en la grupo. Ĉiuj instruis en lernejo por blinduloj aŭ edukis instruistojn por blinduloj.

La plej juna virino, Eri, ankoraŭ estis studento. Ŝi rakontis ke iu svedo erare taksis ŝian aĝon je 15, sed ŝi estas 21-jara.

Unue ni iris al la urba biblioteko, kie Inga Johanson montris japanajn gazetojn kaj librojn kaj eĉ esperantan libron de japana verkistino. Trovigas speciala sekcio por vidohandikapuloj: "Läs och Skrivstugan" (la ĉambro por legado kaj skribado). Tie ili povis testi diversajn ilojn kiuj transformas la presitan tekston en aŭdeblajn vortojn au en brajlan tekston.

En la klubejo ĉiu prezentis sin kaj ĉiris ion pri si mem por ke la blinduloj havu tempon rekoni la voĉon por venonta interparolo. Entute ni estis 13 personoj. Bone, ĉar estis problemo veni al la klubejo ĉar je tiu tempo la tramoj al Masthuggstorget ne funk-

ciis pro novkonstruado de la trakoj. Ni manĝis sandviĉojn, torton kaj japanajn bombonojn. La etoso estis agrabla.

Post la restado en Gotenburgo, Toshiako forveturos al Helsinki por renkonti Arvo Karvinen. Arvo volas informi Toshi-on pri Esperanto. Tamen ni donis al la grupo paperan informon el www.esperanto.se pri Esperanto en la angla kaj el Jarlibro ili ricevis adresojn en Tokio.

La plejparto de la interparolo fakte ne temis pri Esperanto, sed pri handikapo. Handikapo ne malhelpu al iu fari ion. Oni nur devas trovi alian manieron agi. Ekz: en la ŝtata blindlernejo en Tokio oni ekzercis volejbalon, sed la pilko ĉiam troviĝas proksime al la planko. Toshi estas fervora skiisto.

Yoshiko antaŭe estis la instruistino kaj de Eri kaj de Toshi. Ŝi vere estas sukcesplena! La tuta grupo ŝajnis juna kaj vigla. Se iu pensus ke blinduloj irus malrapide, li/ŝi erarus pri tia grupo. La cent ŝtupoj inter la parkejo kaj la klubejo ne estis problemo por ili. Por helpi nin memori iliajn nomojn ili mallongigis ilin. Do, ili nomighas Aki, Eri, Naho, Toshi, Fumiko, Yoshiko.

En la klubejo ni aŭskultis muzikpecojn de Bellman, Birger Sjöberg kaj David Hellström de kompakta disko de Göteborgsmusiken. Aki volis iri al koncerto, sed la plejparto el la muzikistoj ja libertempas. - Ĉu en Gotenburgo troviĝas muzeo, en kiu oni povas tuŝi la objektojn, estis alia demando. Bedaŭrinde neniu povis jesi. - De kiuj landoj la enmigrintoj en Gotenburgo venas? - Kiom da homoj parolas Esperanton? - Kiom da tempo oni bezonas por lerni la bazon de Esperanto? Ankaŭ ni estis scivolemaj pri la vivo en Japanio. Aki montris al ni kiel kalkuli per abako. Amuze estis kiam Inga regalis la japanojn per origamio kaj materialoj por pli da origamio. Post nelonge ili donis al la klubo "origamajn grupojn". La impresado de la vespero estis, ke interkultura komunikado estas pliriĝiga.

- Saluton, diris Naho survoje al la hotelo. Ni forgesis instrui ilin pri "ĝis revido". Ni esperas ke la esperantogrupo de la blindlernejo, kiun Krizantemo instruas, kreskos post la vizito en Svedio kaj (por Toshi) ankaŭ en Finnlando kaj Nederlando. La tutan vesperon ni ja fakte parolis la anglan - io tre malofte en la Esperanto-klubo.

Siv Burell

Novajoj de EsperantoGården

En la fasta semajnfino de septembro okazis jarkunveno de Esperanto-gården. Kvankam la nombro de la trankoj kreskis, kreskis ankaŭ la kostoj kaj la enspezoj ne sufiĉis por ke la kalkuloj bone finiĝu. Oni elektis novan estraron kiu inkludas jenajn personojn: Gunnar Farm, Sundsvall, Anders Rylander, Malmö, Torun Jansson Lund, Per Åke Sandberg, Lesjöfors kaj Melita Dörr, Kumla. La ĝisnuna prezidanto, Bengt Nordlöf restas kiel adjungita al la estraro por helpi per sia granda sperto kaj kono de la laboro. Kiel evidente, la organizaĵo estas en granda bezono de apogo kaj mone kaj labore, do, ne perfluu nun sed aŭdo la vokon al aktivecoj kaj monhelpo!

En la semajno 46 t.e. inter la 11-a kaj 17-a de novembro ni havos semajnon dum kiu ĉiuj estas bonvenaj al E-gården. Mia ideo estas ke oni venu laŭ sia ebleco iun ajn tagon en ĉi tiu semajno por konatiĝi kun la problemoj kaj por helpi per ilia solvo. Nur se oni profundighas en la vivon de la domo oni pli bone komprenas kiamaniere oni povu eble kreskigi la enspezojn kaj ankaŭ malkreskigi la kostojn. Krome oni venas al pli bona kontakto kuna la aliaj membroj kaj kun la estraro kaj dommastro (Lennart Svensson) Restado dum tiu ĉi semajno por la helpantoj estos senpaga, manĝo laŭ elekto en propra aranĝo aŭ ĉe Lennart al aktualaj prezoj. Unu el la tagoj, proponu jaŭdon, ni povus sidiĝi kune kaj prilabori pensojn kaj ideojn pri la daŭriga laboro. Venu multnombre, vi estas bezonataj!

Atendu Novan Jaron en Esperantujo! Inter ni estas sufiĉe multaj personoj kiuj devenas el alia lando, kun malsimilaj kutimoj ĉirkaŭ la festado de jarfino. Tio donis al mi ideon kolekti diversnaciajn esperantistojn por ke ĉiu laŭ siaj eblacoj kaj siamaniere prezentu por la aliaj kion oni faras, manĝas, kantas, ludas, vestas sin ktp. en la ligo kun novjaraj kaj kristnaskaj festoj. Ankaŭ estas esperantistoj en la najbaraj landoj estas bonvenaj kaj laŭ mia opinio tiopovus esti interesa aranĝo ne nur por ni mem sed ankaŭ por montri al cetera mondo ke esperanto funkcias.

Melita Dörr

Gvidlinioj por informado pri Esperanto

En la Universala kongreso en Tel-Avivo en 2000, la komitato de Universala Esperanto-Asocio akceptis gvidliniojn por informado. Ilin legu ĉiu esperantisto.

La Gvidlinioj estas bonega diskutmaterialo por kluboj, progresigaj kursoj kaj Esperanto-aranĝoj.

Celoj

Konsciigi la publikon pri la problemoj en la nuna internacia lingva ordo: Ĉia informado pri Esperanto estas senperspektiva, se la celgrupo ne konscias pri la ekzisto de lingva neegaleco kaj la nedemokratieco de la nuna internacia lingva ordo. La unua celo de la informado devas sekve esti ke la ĝenerala publiko malkovru la fundamentan nedemokratiecon de komunika sistemo, kiu tutvive privilegias iujn sed postulas de aliaj jarojn da penoj por atingi tamen malperfektan lingvoscion. En la strebado estiĝi diskuton pri lingva egaleco kaj lingvaj rajtoj troveblas multaj potencialaj aliancanoj kun similaj celoj. Ekzistas multaj sciencaj verkoj pri la efikoj de lingva neegaleco je tutmonda, loka kaj individua niveloj. Indas, ke respondeculoj pri informado bone trastudu la temon. Por ŝanĝi la realaĵojn necesas unue ĝisfunde ekoni ilin.

Konsciigi la publikon pri la ekzisto kaj funkciado de Esperanto: Esperanto estas unika fenomeno, kaj antaŭ ĉio necesas ke la esperantistoj mem plene konsciu pri tio. Ĉiu esperantisto povas rakonti pri personaj spertoj kiuj ofte estas tute neimageblaj al eksteruloj. Konkretaj spertoj kaj veraj homoj el foraj landoj estas la plej konvinka rimedo por atentigi la publikon pri la ekzisto de tiu fenomeno. Gravus ja ke la informado ne estu tro abstrakta: imponi povas personaj riĉiĝoj pere de Esperanto, emociaj kaj intelektaj. Informado pri Esperanto devas unuavice esti ĝuste informado, ne propagando. En informado ĉefan rolon havu veraj informoj, ne sloganoj ("Lingvo de paco kaj amikeco", "Ĉies dua lingvo" ktp.). Ne ĉiu volas lerni Esperanton, sed multo estas atingita, se oni sukcesas konsciigi pli vastan publikon pri tio ke Esperanto estas vera vivanta lingvo kun parolkomunumo kiu ampleksas la tutan mondon, lingvokomunumo en kiu ĉiu ano povas senti sin plenrajta membro. Jam tio estas revelacio por la plej multaj homoj. Por efike informi

pri la ekzisto kaj funkciado de Esperanto necesas ke la esperantistoj mem pli profunde konu la fenomenon Esperanto, kaj sekve pli kuraĝe argumentu kontraŭ eraraj prezentoj.

Proponi Esperanton kiel solvon en konkretaj situacioj: Nur post kiam la unuaj du celoj estas almenaŭ parte atingitaj, eblas serioze proponi uzon de Esperanto kiel solvon en iuj konkretaj situacioj. Necesas ĉiam konscii ke Esperanto ne estas magia bastoneto, kiu per unu frapo povus forigi ĉiujn problemojn de lingva neegaleco. Antaŭ ol proponi Esperanton en konkreta situacio, necesas ĝisfunde pripensi, kiun precizan rolon Esperanto povus havi, kiaj estus la avantaĝoj kaj malavantaĝoj, kaj kiaj estos la argumentoj de la kontraŭuloj. Sed en kazoj kie la avantaĝoj estas klaraj kaj la kontraŭargumentoj facile refuteblaj, oni kuraĝe faru sian proponon, aŭ se eble, simple ekuzu Esperanton.

Kuraĝigi al lernado de Esperanto: Lerni Esperanton volos unuavice homoj kiuj konscias pri la problemoj en la nuntempa internacia lingva ordo aŭ sentas sin altirataj de la tutmonda egaleca lingvokomunumo de la Esperanto-parolantoj. Sekve la plej bona maniero varbi kursanojn estas konsciigi la publikon pri la ekzisto de lingva neegaleco kaj pri la ekzisto de tutmonda, egalece funkcia lingvokomunumo, en kiu ĉiuj bonvenas. Malmultaj deziros eklerni Esperanton nur pro tio ke ĝi estas relative facila lingvo. Ne la gramatikaj detaloj sed la fakto ke ĉiu povas igi Esperanton sia propra lingvo, igas ĝin unika kaj lerninda.

Rimedo

Je la nivelo de UEA

Unuaviciaj celgrupoj: Landaj Asocioj de UEA; internacie agantaj, influ-kapablaj organizaĵoj kaj individuoj kiuj jam interesiĝas pri lingvaj rajtoj, organizaĵoj kaj medioj kie aktualiĝas demandoj pri egaleca komunikado; la informita ĝenerala publiko tutmonde, sed aparte en landoj, kie ne ekzistas organizita Esperanto-movado.

Taskoj: Gvidado de la informagado je landa nivelo; kontaktoj kun internaciaj organizaĵoj kaj laŭeble informado rekte al la monda publiko; ĝenerala informado en regionoj sen organizita movado. Por subteni la informan agadon je landa nivelo la Informa Fakto de UEA strebu regule disponigi al la Landaj Asocioj gazetarajn komunikojn kaj pretajn modelajn ar-

tikolojn facile tradukeblajn kaj adapteblajn al lokaj cirkonstancoj. UEA ankaŭ strebu disponigi en siaj Interretaj paĝoj koncizajn respondojn al oftaj demandoj pri Esperanto kaj kolekton de modelaj informiloj diverslingvaj. Ĉe internaciaj organizaĵoj UEA unuavice flegu la rilatojn, informu pri la esperantista agado kiu konformas kun la celoj de la koncernaj organizaĵoj kaj tiel montru la utilon de pluj kaj pliaj kontaktoj por ambaŭ partioj. UEA ankaŭ laŭeble strebu konsciigi respondeculojn de la organizaĵoj pri la problemoj en la nuna internacia lingva ordo, sed tiuj strebadoj ne malutilu al la bonaj rilatoj kun la koncernaj organizaĵoj. UEA aktive serĉu kontakton kun medioj kie oni diskutas problemojn rilatajn al lingva egaleco kaj tutmonda komunikado, kaj senpasi informu pri la ekzisto kaj funkciado de Esperanto.

Je la nivelo de landaj asocioj

Unuaviciaj celgrupoj: Lokaj grupoj kaj individuaj membroj de la Asocio; landnivelo aŭ internacie agantaj, influ-kapablaj organizaĵoj kaj individuoj kiuj jam interesiĝas pri lingvaj rajtoj; naciaj aŭ lokaj organizaĵoj kaj medioj kie aktualiĝas demandoj pri egaleca komunikado; ĵurnalistoj de tutlandaj amaskomunikiloj kaj la ĝenerala informita publiko.

Taskoj: La ĉefa respondeco pri informlaboro kuŝas ĉe la nacia nivelo. La landa asocio provizu la lokajn grupojn kaj la individuajn membrojn per aktuala kaj profesie produktita informmaterialo, starigu debat-servon kiu rapide reagu al eraraj prezentoj de Esperanto en tutlandaj kaj lokaj amaskomunikiloj, kaj ĝi aktive kontaktu organizaĵojn kaj individuojn kiuj povas interesiĝi pri egaleca tutmonda komunikado.

Je loka kaj individua nivelo

Unuaviciaj celgrupoj: Lokaj organizaĵoj kaj individuoj kiuj interesiĝas pri lingvaj problemoj, ĵurnalistoj de lokaj amaskomunikiloj kaj la ĝenerala publiko.

Taskoj: Informado pri konkretaj aranĝoj, kontaktoj kun lokaj ĵurnalistoj. La individuaj esperantistoj mem estu pli forte konvinkitaj pri la valoro de la fenomeno Esperanto, kaj ili havu sufiĉajn sciojn por kuraĝe kaj konvinke argumenti kontraŭ eraraj prezentoj. Pli gravas la kvalito ol la kvanto de la informado.

Ny bok om gammalt språk

RECENSENTER
BEHÖVS

Vill du recensera böcker för La Espero? Ta kontakt med redaktören, se sid. 2, och berätta vilka slags böcker du vill recensera: prosa, poesi, facklitteratur (vilket ämne).


Man kan också skicka in spontana bokrecensioner, alltså skriva om en ny bok man läst utan att i förhand ha tagit kontakt med redaktören.

La Espero behöver fler medarbetare.

Tore Janson: Latin. Kulturen, historien språket. Wahlström & Widstrand. Stockholm 2002. 264 sid.

Böcker om världsspråk börjar bli populära. Efter Jan Svartviks "Engelska. Öspråk, världsspråk, trendspråk" kommer nu Tore Jansons "Latin. Kulturen, historien, språket.", som är en presentation av latin och dess betydelse. Boken består av tre delar. Den första delen behandlar latinet och romarna. Som esperantist uppmärksammade jag särskilt avsnittet om hur latinet, som länge bara var ett av många språk i Italien, kunde bli det dominerande språket i den västra rikshalvan. Soldaterna och den militära organisationen var en viktig faktor. Unga män i provinserna som ville bli soldater måste lära sig språket. De som sysslade med handel kom också att lära sig och använda latin. Längre dominerade dock grekiska i skolorna.

Det andra avsnittet behandlar latinet och Europa under den tid då latinet var det dominerande internationella språket i Europa, vilket var fallet ända till 1600-1800-talen då latinet sakta men säkert fick ge plats för de



moderna språken. Ännu Carl von Linné (1707-1778) publicerade dock alla sina böcker på latin.

En föregångare när det gäller att skriva på sitt eget språk var Galileo Galilei (1564-1642). Hans ämne, astronomi, var inte ett ämne som hade någon större plats på universitetet, och han var därför mer revolutionär än traditionsbevarare.

Det tredje avsnittet i boken är en kort latinsk grammatik. Språkfrågor, framför allt frågan om vilka latinska ord som finns i moderna språk, tas dock upp i hela boken.

"Latin. Kulturen, historien, språket" är en välskriven och underhållande skildring, lämplig för alla som är intresserade av språk och historia.

Leif Nordenstorm

Esperanto donos voĉon al Nobel

Denove, neni Nobelpremio al William Auld, ho ve. Nu, ankaŭ Kertész Imre ne estas malbona, ĉu?

Aliflanke, se esperantlingva verkisto ne ricevis Nobelpremon, aliflanke esperanto povas doni voĉon al la silentigita dramverkisto Alfred Nobel.

Ĉu vi ne auxdis pri la dramverkisto Alfred Nobel? Honeste dirite, ankaŭ mi mem ne tion faris ĝis antaŭ unu jaro, kiam la sveda verkisto kaj filmregisoro Vilgot Sjöman publikigis sian libron "Vem älskar Alfred Nobel" (Kiu amas Alfred Nobel?) kaj tie menciis lian dramon "Nemesis", verkita baldaŭ post lia testamento kaj presigita tuj antaŭ lia morto en 1896 - en Parizo, sed en sveda lingvo, en 100 ekzempleroj, el kiuj liaj postvivantoj tuj (sub eklezia premo) detruis 97, kaj poste malaperis 2; do restas 1, en la Sveda Regna Arkivo, de kiu mi aĉetis fotokopion. Mi tradukis ĝin en esperanton, kaj baldaŭ (mi esperas antaux la ĉijara Nobeltago) aperos ĉe Eldona Societo Esperanto dulingva eldono - fakte la unua svedlingva eldono ne detruita...

La dramo estas forte kontraŭkatalika, do Dario Fo kaj José Saramago fakte estis premiitoj tute laŭ la gusto de la doninto.

Kaj la instiganto al la detruo de la unua eldono? Li estis tiam pastro ĉe la sveda legacio en Parizo, poste iĝis nia ĝis nun plej fama arkepiskopo kaj finfine ricevis la Nobelpremon pri paco - Nathan Söderblom...

Gunnar Gällmo

Novjara festeno intenacia !! Silvestra vespero 2002

Karaj gesamideanoj!

Vi estas kore bonvenaj festi jarfinon ĉe EsperantoGården en Lesjöfors en Vermland. Nia ideo estas ke unuopuloj aŭ pli/malpli grandaj grupoj prezentu ion tipan por sia nacio, ekzemple:

- * Popolkostumojn
- * Muzikon - kantojn, diskojn k.sim.
- * Manĝaĵojn
- * Artajn programerojn
- * Krome: loterio, libroaŭkcio kaj pli, laŭ ideoj de la ĉeestantoj

Je via dispono: bone ekipitaj kuirejoj, piano, stereofonia instalaĵo, salonoj de diversa grandeco.

Tranokto en du- aŭ plurlitaj ĉambroj. Modestaj prezoj. Restoracio. Estus tre ĝoje se ni estus multaj kaj farus ĉi tiun feston ĝojplena, enhavriĉa kaj amikeca tradicio.

Pliaj informoj kaj anoncoj: Melita Dörr, Hagendalsvägen 25, SE-692 30 Kumla, telefono: +46 19 58 32 52 E-poŝto medor@swipnet.se aŭ egarden@esperanto.se

PROVERBOJ

"Proverbaro Esperanta" de Zamenhof donas bonegan provizon da proverboj. Jen kelkaj:

Peko kaj eraro estas ecoj de l' homaro.

Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras.

Kiu fremdan avidas, propran forperdas.

Kiu rabi eliras, ofte nuda revenas.

Per pacienco venas scienco.

Post sufero venas prospero.

Apud plena manĝotablo ĉiu estas tre afabla.

Patroj avaras, infanoj malŝparas.

Petro kornojn tenas, Paŭlo lakton prenas.

Komenco Aprila - trompo facila.

Lernu juna - vi scios maljuna.

Se Peĉjo ne semos, Petro ne rikoltos.

Individuell medlem i Universala Esperanto-Asocio

Genom att bli individuell medlem i UEA ger du den internationella esperantorörelsen ett extra stöd.

Du får också ut mer av esperanto genom att bli medlem. Du får UEA:s årsbok med namn och adress på delegater i hundratalet länder, om man är MA-medlem får du även tidningen Esperanto, som ger dig värdefull information om vad som händer i esperantovärlden. Dessutom ger medlemskapet dig rätt till lägre kongressavgift, se nedan.

Du betalar avgiften genom att sätta in pengarna på postgiro 14 74 29-5, SEF specialkonto. Ange på talongen vad pengarna avser. Frågor kan besvaras av Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94, Hörby, Tfn 0415-501 52.

Avgifterna för 2003 är följande.

Kategori:

MA	Direktmedlem med årsbok och tidningen <i>Esperanto</i> . Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem i TEJO och får <i>Kontakto</i> . Ange födelseår!	480 kr
MJ	Direktmedlem med årsbok. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får <i>Kontakto</i> . Ange födelseår!	190 kr
MG	Direktmedlem med <i>Gvidlibro</i> . Ger inte nedsatt kongressavgift.	80 kr
SZ	Avgift för <i>Societo Zamenhof</i> , särskild stödorganisation. Ger inte medlemskap i UEA.	960 kr
PT	"Patrono de TEJO" får tidningen <i>Kontakto</i> .	570 kr
DM	"Dumviva membro" betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken.	12 000 kr
DMJ	"Dumviva membro kun jarlibro" betalar för hela livet. Får årsboken.	4 750 kr
DPat	"Dumviva Patrono" betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken och blir därtill ständig medlem i <i>Societo Zamenhof</i> .	120 000 kr
DPT	"Dumviva Patrono de TEJO" betalar för hela livet och får tidningen Kontakto.	14 250 kr



Dags att anmäla sig till universella Esperanto-kongressen i Göteborg 2002

Anmälningsavgifter (Svenska kronor)

Anmälningsblankett för kongressen kan beställas hos: Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel 0415-501 52. Blanketten skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till SEF Specialkonto, postgiro 14 74 29-5. Ange på talongen vad pengarna avser.

	-31 dec	-31 mars	1 apr-
1. Icke direkt medlem i UEA	1770 kr	2185 kr	2605 kr
2. Direkt medlem i UEA (ej MG)	1400 kr	1770 kr	2140 kr
3. Medföljande, handikappad eller ungdom (född mellan 73-01-01 och 82-12-31), som inte är medlem i UEA	1070 kr	1305 kr	1580 kr
4. Medföljande, handikappad eller ungdom, som är medlem i UEA.	700 kr	790 kr	1070 kr

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 82-12-31 betalar ingen kongressavgift.